# *Kubaj artistoj kaj intelektuloj kontra? la tutmonda koloniiga ondo*




**Foto: Liesther Amador, Uneac**

Havano, jun 30 (RHK) Rubomuziko kaj kantoj hodia? invadas la sonuniverson de la mondo kaj anka? de Kubo, kiu ne estas fremda al tiaj malsanoj kaj kapdoloroj, la? intelektuloj el la kariba insulo.

Temoj kiel kultura koloniigo kaj la promocio de malbona gusto estis la fokuso de la debatoj en la lasta kunveno de la Nacia Konsilio de la Unio de Verkistoj kaj Artistoj de Kubo (Uneac), okazinta ?i-semajne en la ?efurbo de la Domo de la Amerikoj.

La ?eestantoj konigis siajn kriteriojn rilate la raporton de la renkonti?o, "Kulturo kiel transforma energio fronte al la tutmonda koloniiga ondo", konsiderante la realecon de la amaskomunikilaro kaj kultura hegemonio kiun la centroj de potenco ekzercas super milionoj da homoj.

La alarmo sonas de pluraj jaroj en ?iu kunveno de UNEAC kun siaj ekvivalentoj el la institucioj de Kuba Registaro, precipe koncerne la disvastigon de malaltkategoriaj produktoj de la monda distra industrio en la radiocirkvitoj, la televido kaj la sociaj amaskomunikiloj.

"?ajnas nekredeble al mi, ke ni ne kapablas eldiri politikon por reakiri nacian suverenecon super muzika konsumo en nia lando", diris la kantverkisto Israel Rojas, gvidanto de la grupo Buena Fe.



**Israel Rojas, muzikisto./Foto: Liesther Amador, Uneac**

La zorgo kovras anka? tion, kio okazas en multaj el la turismaj instala?oj de la lando, ne malmultaj el ili cititaj kiel referenco por tio, kion oni ne faru rilate al la promocio de la plej bona el kuba kaj internacia arta talento.

Por la membro de la sekretariejo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Kubo Rogelio Polanco, ?eestanta en la kunveno, la kultura malkoloniigo estas batalo de la tuta socio kaj la institucia kadro, kun niaj intelektuloj, artistoj kaj kreintoj ?e la avangardo.

En la plenkunsido, la kritikisto kaj eseisto Víctor Fowler parolis pri la konservado de la kultura identeco, la alproprigo de novaj teknologioj kaj la konstanta modernigo de la kritika pensado en la batalo kontra? tiu plago, de kiu ni ?iuj estas parto.

La? Rojas, „ne estos facile batali ?i tiun batalon per niaj rimedoj kontra? la tutmondigita industria kultura ma?inaro, per nia strategio kaj niaj ciferecaj rimedoj, per niaj juraj dispozicioj kaj la ordigo de ununura hierarkia platformo, kun nia propra hegemono. "

La artisto kritikis la manieron en kiu prioritatoj estas pritraktitaj en la kuba muzika medio. Ne ekzistas ordo, reguligo, a? jura instrumento, kiu reguligas la cirkuladon de muziko, en la jam evidenta kaj nekontestebla merkato de la kuba muziko, li opiniis.

Pri la malabundeco de rimedoj, la artisto vokis pli profiti la radio-televidan sistemon  de la kuba Revolucio, same kiel la kompaniojn kaj instituciojn dedi?itajn al la promocio de la arto.
Li anka? aludis la bezonon establi viglan ciferecan platformon por reakiri nacian suverenecon en la konsumado de muziko en Kubo.

Koncerne la gravecon, kiun la cifereca universo gajnas ?iutage pli kaj pli kaj la valoron de ?iaj konoj, la partoprenantoj de la renkonti?o proponis realigi kampanjon pri ciberalfabeteco por ke la homoj konu kaj regu la teknologiojn je sia dispono.

Fonto: PL

---